FORUMO

n-ro 130
(3-4/2005)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

## Atako de pola polico kontraŭ gejmanifestacio p 5

## Gejpersekutanta pastoro evitis malliberejon p 7

## La sveda eklezio benas samseksajn parojn p 8



Ĝustigo 2
Restaŭrita redaktanto 2
Eldonplano por 2006 2
FORUMO nia forumo 3
La nova retejo 3
Parolas la sekretario 3
Beletra niĉo 4

## L.S.G.
### Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

**Retejo:** http://lsg-esperanto.org
**Adreso, retpoŝto:** Vidu ĉe la sekretario-kasisto sube.
**Membriĝo:** Kontaktu la sekr.-kasiston.


### ESTRARO

**Prezidanto:**
Arnold VICTOR
Apartment. 1
160 West Eleventh Street
New York City
New York 10011
Usono,
arvimide(ĉe)earthlink.net
**Sekretario-kasisto:**
Rolf,
lasekretario(ĉe)gmx.net /
lakasisto(ĉe)gmx.de
**Estrarano pri varbado:**
Francis,
fsoghomonian(ĉe)yahoo.fr
**Estrarano:**
Torstein, kvakke(ĉe)hotmail.com



### FORUMO – membrogazeto de LSG
### N-ro 130 (3-4/2005)

**Adreso, retpoŝto:** Vidu ĉe la redaktanto.

**Provizora redaktanto de FORUMO kaj prizorganto de la RETEJO:**
Andreas,
...@....com

**Kontribuoj** al la gazeto ĉiam bonvenaj, vidu apartan artikolon ĉi-numere. **La gazeto aperas ankaŭ rete kiel PDF-dosiero. Por via integro ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigitaj el la reta versio.**

**Ekspedo de FORUMO:** La sekretario-kasisto, vidu supre. Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto, se estas ĉeĥa adreso! La persono ne estas ligano. Ni nur forsendas la gazeton el Ĉeĥio pro la favoraj poŝttarifoj.


## Ĝustigo

La artikolo "Kial Usono drivas en homofobion?" en la antaŭa numero (Forumo 129) estas skribita de Robb, kaj de neniu alia. Ni petas pardonon pro la intermikso.

*red.*

## Restaŭrita redaktanto

Mi provizore revenis kiel redaktanto de FORUMO ĉar la antaŭa redaktanto Igor Couto bedaŭrinde ne havas sufiĉe da tempo por la laboro. Sed pro personaj kialoj mi ne povas daŭrigi la laboron longe, same pri la retejo, kiun mi ankaŭ prizorgas. La estraro do serĉas du personojn, redaktanton kaj retprizorganton, aŭ unu personon por ambaŭ taskoj. Se vi interesiĝas, ne hezitu kontakti la estraron. La estraro daŭre helpos vin en la laboro kaj komence ankaŭ mi.

*Andreas*

## Eldonplano por 2006

N-ro: limdato* / dissendo

131: 4 februaro / 28 februaro
132: 7 aprilo / 29 aprilo
133: 27 junio / 15 julio
134: 19 aŭgusto / 5 septembro
135: 12 novembro / 30 novembro

*) lasta tago kiam viaj manuskriptoj estu ĉe la redaktanto

Kune kun n-ro 132 venos la Korespondda adresaro kaj la listoj de Gastiganta servo kaj Kongresa servo.

*red.*

## FORUMO nia forumo

Membrogazeto ne estas membrogazeto, se la membroj ne troviĝas en ĝi! Tial pripensu, ĉu vi povas verki iun tekston: artikolon, poemon, amuzaĵon ktp por la gazeto. Ankaŭ bildoj aŭ desegnaĵoj estas bonvenaj. Adresoj en p. 2. Kaj ni precipe bonvenigas materialon, kiu povus interesi niajn virinajn legantojn.


Kelkaj sugestoj de artikoloj:
1. Niaj membroj dise en la mondo rakontas pri la situacio de samseksamuloj k.s. en sia lando. Oni ne devas fari detalan raporton, prefere ne, sed rakontu iom pri viaj personaj impresoj kaj spertoj. 2. Rakontu pri iu esperantoaranĝo, kiun vi partoprenis. Povas esti ia ajn aranĝo. 3. Skribu pri iu vojaĝo, kiun vi faris, ĝi ne devas estas ligita kun Esperanto. 4. Dividu kun ni ion pri via propra vivo, aŭ pri iu okazintaĵo en la vivo. Vi povas skribi anonime.

*red.*

## La nova retejo

Kore bonvenaj viziti nian novan retejon ĉe **http://lsg-esperanto.org** ! Finfine LSG havas novan funkciantan retejon kun propra domajno kaj sen reklamo! Ke ni havas propran domajnon signifas, ke ni mem povas decidi la nomon de la adreso de la paĝo – la estraro do elektis: "lsg-esperanto.org". (La simpla formo "lsg.org" bedaŭrinde ne estas libera.) La retejo havas novan modernan aspekton. En ĝi vi povas legi malnovajn retajn numerojn de Forumo, fariĝi membro de LSG per la reta formularo, anonci vin por la membroservoj Koresponda adresaro, Gastiganta servo kaj Kongresa servo, trovi la statuton kaj retadresojn al la estraranoj kaj multe pli. En tabulo la estraro metos gravajn mesaĝojn – iru al la paĝo de temp' al tempo por vidi ĉu iu novaĵo aperis. Kaj baldaŭ ni ekfunkciigos servon pagi la kotizon interrete per kreditkarto – bonvenon al moderna retejo por la servo de la membroj!

*red.*



## Parolas la sekretario

Kune kun tiu ĉi FORUMO vi ricevas la realiĝilon por 2006. Bonvolu nepre plenumi kaj resendi ĝin al via sekretario, ankaŭ se vi jam pagis por 2006 aŭ estas trijara aŭ eĉ dumviva membro! Nur tiamaniere mi ekscias, ke vi ankoraŭ vivas, via adreso plue validas, ĉu vi estos ĉi-jara gastiganto, korespondemulo ktp. Ankaŭ menciu, ĉu vi planas viziti la Florencan UK-on aŭ alian Esperanto-aranĝon, kio povas esti interesa ankaŭ por aliaj geliganoj. Koresponda adresaro kaj Listo de gastigantoj aperos kun Forumo 132 fine de aprilo.

Feliĉan 2006 por vi ĉiuj!

*rk*

# Beletra niĉo

**ATENDADO**

Mi kvazaŭ oceana konko estas
surborde sole mi kuŝas
fermita
sed plena de trezoroj
konfida kaj trankvila
enamiĝinta...
en la gutoj de roso
en la brilanta pejzaĝo de kristala akvo
en la muziko de la grenoj
en la kanto de frumateno
Mi atendas
la revenon de OCEANO



**IAM**

Kiam vi sola sidos en malhela ĉambro
kaj sur via vango
fluos larmo
ne pensu kara, ke solas vi en la mondo
ĉar ĉiam kun vi
estos....
mi........

La 17an de februaro 2004 forpasis eksterordinara virino. Mi havis plezuron esti ŝia filo. Jen kelkaj vortoj surbaze de kanzono, omaĝe al ŝi dediĉas mi… Princo…



**PANJO...**

Malĝoj' ĉi tie
arboj kreskas alie
kaj en la kor'
granddolor'
Panjo vere mi ne plendas
hejmen mi sopiras
al via am'
al via man'
Hejmon vidas mi
pri via amo revas mi
kaj ĝarden' plena del' flor'
belaspektas kiel kvieta sonĝ'
Panjo kore vin mi enlulas
leteron al vi skribas
longtristan kiel peĉan nokt'
Sed ne gravas PANJO
hodiaŭ nova tago
kaj denove vivos mi
sed dormu vi bel'
ĉielo plena de l' stel'
Ho PANJO....

*Ĉiuj de* ***Princo***

# Atako de pola polico kontraŭ gejmanifestacio

**Jena raporto de Paŭlo el Pollando venas el retlisto *lsg-ano.***

La historion pri la fifama atako de la polico kontraŭ la marŝo de egaleco en Poznano, Pollando, jam multaj konas. Mi volas priskribi pli detale la situacion kiu okazis tiam kaj la reagon kiu leviĝis poste.

La marŝoj de egaleco okazadas en Pollando jam de kelkaj jaroj. Ili ne estas nur gejaj marŝoj, sed celas ĝenerale ksenofobion, kaj laŭtigas la situacion de diversaj minoritatoj, pri kiuj la socio ne volas ekscii, ekz. la situacion de handikapuloj. La marŝoj denature estis incitaj al diversnivelaj aŭtoritatoj ĉar ĉiam montriĝas ke tiuj ofte pekas kontraŭ diversaj grupoj kaj ne agas tiom bone, kiom ili volas sin prezenti. La marŝoj estas ofte malagrablaj al la tuta socio, ĉar ili rememorigas al ĝi la aferojn, kiujn oni prefere volus forgesi.

Mi ne scias ĉu de la komenco dum la marŝoj oni tuŝis kaŝitan gejofobion en la pola socio, tamen la marŝoj aperis en la amaskomunikiloj, kiam ilin komencis akompani kontraŭmarŝoj de, mi diru tion klare, faŝismema junularo. Kompreneble tiu akompano havis neniun pacan intencon, kaj subite okazis ke la formala ĉeesto de polico estis sava. La faŝismema Mlodziez Wszechpolska (Tutpola Junularo) volis ne nur voĉe ataki – gegejoj makulas laŭ ili la polan socion.

La problemo de ŝajna batalado montriĝis bona okazo por aŭtoritatoj malaprobi al postaj marŝoj. Laŭleĝe ĉiu publika manifestacio devas ricevi aprobon de aŭtoritato, kiu rajtas malaprobi ĝin kiam estas suspekto, ke dum la manifestacio mankos la sekuro por ĉeestantoj aŭ ilia posedaĵo. Tamen la organizantoj pritaksis tiun kaŭzon falsa, kaj kelkaj marŝoj okazis spite la mankon de oficiala aprobo. Feliĉe tiujn marŝojn akompanis ĉiam la polico. Antaŭan jaron en Krakovo la situacio estis vere malfacila, ĉar en urbon venis multaj faŝismemaj ekstremuloj, kaj nur danke al bona reago de la polico la du grupoj ne renkontiĝis.

La afero de la marŝoj iritis politikistojn, i.a. freŝe elektitan prezidenton de Pola respubliko, Leĉ Kaczynski. Ĉi-jare en junio oni planis marŝon de egaleco en Varsovio. Leĉ Kaczynski, tiam estro de la urbo, deklaris sian malaprobon, sed ne pro suspekta manko de sekuro – sed pro la danĝero "propagandi devion". Tamen la marŝo denove okazis sen aprobo, kelkaj miloj da manifestantoj venis al pola parlamento.

Tion, kio okazis novembre en Poznano, neniu antaŭvidis. Ĉio ŝajnis okazi laŭkadre. La organizantoj ricevis malaprobon de la urbestro, Ryszard Grobelny. La kaŭzo – manko de sekuro. Ili petis aprobon de la vojevodo (la provinca estro), sed denove rifuzo. La marŝon oni volis komenci apud la Malnova Bierfarejo, nuntempe tre populara (kaj mi diru tre bela) vendejcentro. Kelkcent da manifestantoj ariĝis postagmeze 19 de novembro, kaj tuj ilin ĉirkaŭis policistoj. Post unu horo la polico komencis po unu eltiri manifestantojn. Kelkaj policistoj agis fervore, kaj fariĝis iom post iom pli agresivaj. Kelkaj homoj

baraktis kaj la polico uzis gumbastonojn. Sesdek personoj estis arestitaj.

La reago de ĵurnalistoj estis tuja. Informoj kaj fotoj aperis ĉie. La kondamno estis klara. La urbestro de Poznano defendis sin dirante, ke la organizantoj ne aprobis ŝanĝon de la loko, la organizantoj diris, ke neniu proponis al ili tiun ŝanĝon.

Pli gravas tamen la reago de multaj aliaj organizoj, kiuj antaŭe ne interesiĝis pri la marŝoj de egaleco kaj estis ambivalentaj al la problemo de gejofobio en Pollando. Dum la semajnfino 26-27 novembro en multaj urboj okazis manifestacioj de solidareco kun la marŝo de egaleco. Oni komune agnoskis la poznanan situacion kiel minacon kontraŭ la demokratio. La polico, pretekste de suspekta danĝero de atako far junaj faŝistoj, atakis pacajn manifestantojn, trouzante sian potencon.

Neniu urbestro kuraĝis malaprobi tiujn manifestaciojn de solidareco, ankaŭ pro tio, ke ĉi-foje ilin aranĝis ne-gejaj organizoj. Mi ĉeestis tiun, kiu okazis en mia urbo, Vroclavo. Dum jam vintra vetero, sur la urboplaco ariĝis kelkcent homoj. Krom la polico akompanis nin ankaŭ junaj faŝistoj el NOP, kriante kutimajn al ili vortojn. Policistoj en flavaj bluzoj izolis ambaŭ grupojn. La kriado havis povran rezulton, ĉar la manifestantoj superis la faŝistojn kelkoble. Aperis unu provo de atako, sed la polico agis tre serioze, kaj tuj poste venis forta grupo de armitaj policistoj kiuj forpuŝis la junajn stultulojn ekster la urboplacon. La manifestantoj laŭte dankis pro tio. En aliaj urboj la manifestacioj estis pli kvietaj, malgrandaj grupoj de dekstraj ekstremuloj nur gapis.

Mi tre ĝuis la aperon de Wladyslaw Frasyniuk, fama aktivulo de Solidareco, kaj nun politikisto de Demokratia Partio. En Varsovio aperis multaj politikistoj el maldekstra kaj verda flankoj. Mi eble nur acide konstatu, ke ili ĉefe reprezentas partiojn, kiuj gajnis malmultan aŭ nenian apogon dum lasta baloto. Tamen ilian aperon mi agnoskas grava, ĉar la situacio estas klare politika, kaj politikistoj devas ĝin ĝuste solvi. Precipe interesaj por mi estis la vortoj de la estro de la hebrea komunumo en Varsovio, Konstanty Gebert, kiu konstatis, ke se gegejojn oni diskriminacias, li eĉ surfrunte povas porti la deklaron: mi estas gejo.

Ŝajnas ke la poznanaj okazintaĵoj vekis fortan reagon en la socio. Ĉu ĝi estos stabila la tempo montros. Geja minoritato fariĝis la pesila montrilo de la pola demokratio. Mi esperas ke profitos ambaŭ nia minoritato kaj la tuta socio. Vere, temas ne nur pri gejoj, temas pri demokratio.

*Paŭlo*



(Se vi volas aliĝi al retlisto *lsg-ano* troviĝas klarigoj en nia retejo http://lsg-esperanto.org – n. d. red.)

## Gejpersekutanta pastoro evitis malliberejon

**La 1an de januari 2003 la sveda leĝo pri persekutado kontraŭ etnoj estis plivastigita al protekto ankaŭ de gejoj. Enlande kaj internacie fama kazo provante la leĝon atingis sian finan verdikton la 29an de novembro 2005.**

Temas pri kontraŭgeja prediko de la libereklezia pastoro Åke Green en 20 julio 2003, kiu fariĝis kazo de la leĝo. Malgraŭ ke la pastoro dissendis invitojn neniu ĵurnalisto ĉeestis la predikon, sed li poste sendis referaĵon al loka gazeto. La referaĵon legis la prezidanto de la loka geja organizo, kiu denuncis la pastoron pro persekuto de etno.

La kazo trairis du kortumajn instancojn, en la unua nivelo li malkondamniĝis, en la dua li estis kondamnita al unumonata malliberiĝo. Sed pro bezono de normiga verdikto la kazo pluiris al la plej alta instanco, ĉar temas pri la liberecoj de religio kaj parolo. Tie li finfine estis jure malkondamnita, sed la kortumo deklaras ke li fakte montris malestimon al la gejoj, kaj estus kondamnita se la kortumo nur devas konsideri la svedajn leĝojn. Sed la kortumo devas ankaŭ konsideri la Eŭropan kortumon, al kiu Åke Green povus apelacii, kaj komparinte kun similaj kazoj en tiu kortumo, oni ne kredas ke Åke Green estus kondamnita tie. Tial oni malkondamnis lin.

La verdikto okazigis fortajn reagojn de la sveda gejorganizo kaj en la sveda gazetaro, la plejmultaj gazetoj opinias la verdikton malĝusta, ke ĝi severe malfortigis la leĝon pri persekutado kontraŭ etnoj. La kondamno en la dua instanco vekis intereson inter kristanaj grupoj en Usono, kiuj donis sian apogon al Åke Green tra la jura procedo.

La titolo de la prediko de Åke Green estas "Ĉu samseksamo estas denaska impulso aŭ malbonaj potencoj kiuj ludas kun homoj?". En sveda kristana gazeto li klarigis sian vidpunkton, ke se samseksamo estus denaska impulso, li ekhavus severajn problemojn kun la Biblio, ĉar tiam la Dio devas esti tre kruela, kiu kreas homojn kun tia impulso kaj samtempe kondamnas la praktikon de la impulso. En la prediko li montris kiel pruvon, ke samseksamo estas memelektita impulso, la biblian tekston de Romanoj 1:26-27, kie estas skribite: "iliaj virinoj ŝanĝis la naturan uzadon en kontraŭnaturan" kaj "la viroj, forlasante la naturan uzadon de la virino, brulis en sia volupto unu al alia". La vortoj "ŝanĝis" kaj "forlasante" laŭ Åke Green pruvas, ke temas pri libervola ŝanĝo, ne io denaska.

Tamen la plej fifama parto de lia prediko, kaj unu el la partoj, kiujn la kortumoj konsideris por la kazo, estas jena: "La Biblio priparolas kaj instruas pri ĉi tiuj malnormalaĵoj. Kaj seksaj malnormalaĵoj estas kancera tumoro en la tuta korpo de la socio. La Eternulo scias ke perversaj homoj eĉ sekse perfortos la bestojn." En alia parto li klarigas ke kiam Paŭlo en la Biblio parolas pri "perversaj homoj" tiam temas ja pri samseksamuloj (vir-uzaĉantoj). En alia parto li diras ke la legiĝo de samseksa kunedziĝo signifos katastrofon por la socio, same kian la samseksamuloj okazigis disvastigante aidoson. Fine de la prediko li tamen aldonas, ke oni ne kondamnu la samseksamulojn, oni amu la

homon, sed ne la pekon. Sed jam la impulso estas peko, en la mondo de Åke Green, ankaŭ se oni neniam praktikas la impulson, ĉar ĝi ja estas, kiel li diras, memelektita impulso.

*red.*


## La sveda eklezio benas samseksajn parojn

**La sveda eklezio decidis starigi benceremonion por samseksaj paroj kiuj legalizis sian partnerecon.**

La 27an de oktobro 2005 la parlamento de la sveda eklezio decidis kun 2/3 plimulto ke oni starigu benceremonion por samseksaj paroj kiuj legalizis sian partnerecon. La ceremonio ne devas esti konsiderata egala al la ceremonio por geedziĝo, sed nur kiel ceremonio por beni la kunvivadon. Protestoj kontraŭ la decido tamen ne mankas, en kaj ekster la eklezio. Unu pastro starigis protestliston en interreto, al kiu pastroj de la eklezio povis subskribi sian nomon. La listo rapide kolektis pli ol 800 subskribojn, sed la pastro devis fermi la paĝon, ĉar multaj subskriboj montriĝis falsaj, ekz. Hitlero troviĝis inter la subskribintoj. Laŭ la decido neniu pastro devas kontraŭ sia konscienco fari la benon, sed la paroĥestro havas la respondecon, ke la ceremonio okazu ie en lia aŭ ŝia paroĥo. Samtempe multaj homoj eksmembriĝas el la sveda eklezio – unu flanko asertas ke la kialo estas ke homoj ne volas resti en eklezio kiu benas samseksajn parojn, la alia flanko diras, ke homoj eksmembriĝas, ĉar montriĝis, ke tiom da pastroj estas kontraŭ la beno. La vero kredeble estas nek-nek, kutime en novembro multaj eksmembriĝas antaŭ la nova kotizpaga eklezia jaro.

Sed oni ja povas demandi sin, kial la rezulto de la voĉdono fariĝis tia, kiam ankoraŭ troviĝas tiel granda rezisto en la klerikaro. Unu el la klarigoj estas ke la parlamentaj partioj estas rekte elektitaj de la membroj de la eklezio, kiuj estas ordinaraj homoj kaj la plimulto eĉ ne aktivaj en la eklezio.

*red.*




daniel



***De ni ĉiuj al vi ĉiuj: Ĝojajn Festotagojn kaj Prosperan Novan Jaron!***